**Ĉefartikolo:** La ĵurnalisto kaj verkisto Paiva Netto verkas “Ezopo, Libero kaj Espero”.

www.bonavolo.com

# BONA VOLO

La Revuo de la Ekumena Spiritualeco • JARO 22 • N-ro 63

ELEVAÇÃO

## La brilo de la Internacia Idiomo

- En la Lando de la naskiĝanta suno, esperantistoj el la tuta mondo kunvenas en la 92a Universala Kongreso
- Legio de Bona Volo aktive ĉeestis en la monda rekontiĝo




La Granda Jokohamo, kiu konsistigas la gigantan Konferecan Centron de Pacifiko.

# LA SUKCESO DE VIA EVENTO ESTAS ĈI TIE!



## PARLAMUNDI DE LBV







Apud la Templo de Bona Volo staras ParlaMundi de LBV: kun sia privilegia arkitekturo, ĝi estas loko kun internacia nivelo por eventoj je malgranda, meza kaj granda dimensioj. Kvinetaĝa, klimatizita konstruaĵo, aŭditorioj por 100 (Tom Jobim), 200 (Austregésilo de Athayde) kaj 500 homoj (José de Paiva Netto), nobla salono, ĉambroj por trejnkunsidoj kun 30, 60 kaj 80 sidlokoj, biblioteko, studareoj, speciala bufedo kun kafoservo, koktelo, *brunch* kaj vespermanĝo, grafik- kaj komputilservoj kun eblo al disvastigo de eventoj, modernaj aŭdvidaj rimedoj.

Fenix Eventos

SGAS 915 - Lotes 75/76 | 1-a etaĝo de ParlaMundi de LBV | Braziljo/DF | CEP 70390-150
Telefonoj.: (+55 61) 3245-8420 / 3346-1836 | Fakso: (+55 61) 3345-1050 | Retejo: fenix.eventos@terra.com.br | www.parlamundi.com.br.

ELEVAÇÃO

BONA VOLO

JARO 22 • N-ro 63

BONA VOLO estas kvarmonata publikigaĵo de IBVj, eldonita de Eldonejo Elevação. Ĝi estas registrita per n-ro 18166, la 16-an/3/2006, sur la libro "B" de la 9-a Notario pri Registro de Biloj kaj Dokumentoj de San-Paŭlo, Brazilo.

**DIREKTORO KAJ ĈEFELDONISTO:** Francisco Periotto MTE/DRTE/RJ 19.916 JP

**ĜENERALA KUNORDIGANTO:** Gerdeilson Botelho

**SKIPO DE ELDONEJO ELEVAÇÃO–PORTUGALLINGVE:** Adriane Schirmer, Daniel Trevisan, Felipe Duarte, Jéssica Botelho, Leila Marco, Maria Aparecida da Silva, Letícia Rio, Neuza Alves, Raquel Bertolin, Rodrigo Oliveira, Rosana Bertolin, Natália Lombardi, Walter Periotto kaj Wanderly Albieri.

**SKIPO DE ELDONEJO ELEVAÇÃO–ESPERANTLINGVE:** Maria Aparecida da Silva, José Roberto Tenório da Silva, Paulo César Pereira kaj Felipe Duarte.

**GRAFIKA PROJEKTO:** Helen Winkler

**KOVRILO KAJ KOMPOSTADO:** Felipe Tonin

**PRESADO:** Mundial Artes Gráficas

**ĈIUJ RAJTOJ DE TIU ĈI ELDONO REZERVITAJ DE EDITORA ELEVAÇÃO:** Rua Doraci, 90 • Bom Retiro • São Paulo/SP • Brazilo • CEP 01134-050 • Tel.: (+55 11) 3358-6868/ Fax: (+55 11) 3358-6882 • www.bonavolo.com




# Traktato pri la Nova Ordono de Jesuo

Instruis la Ekumena Kristo: *"Novan Ordonon Mi donas al vi: Vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos Amon unu al alia. (...) Jen estas mia Ordono: ke vi amu unu alian tiel same, kiel Mi vin amas. Neniu havas Amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian Vivon por siaj amikoj. Vi estas miaj amikoj, se vi faras tion, kion Mi al vi ordonas: Vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. Mi jam ne nomas vin sklavoj, ĉar la sklavo ne scias, kion lia sinjoro faras; sed Mi nomis vin amikoj, ĉar ĉion, kion mi lernis de mia Patro, mi sciigis al vi. Vi ne elektis min, sed Mi elektis vin, kaj starigis vin, por ke vi iru kaj donu frukton, kaj ke via frukto daŭru; por ke la Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi petos de Li en mia nomo. Tion Mi ordonas al vi, por ke vi amu unu la alian, kiel Mi amas vin. (...) Kiel la Patro min amas, tiel Mi ankaŭ vin amas. Restadu en mia Amo".*

(Traktato pri la Nova Ordono de Jesuo, la Ekumena Kristo, kolektita de Paiva Netto, akorde kun la Evangelio, laŭ Johano, 13: 34 kaj 35; 15: 12 ĝis 17 kaj 9).

4 **Ĉefartikolo**
Ezopo, Libero kaj Espero

7 **Registroj**
E-istoj parolas pri LBV


8 **Unuiĝintaj Nacioj**
Tutmondaj Partnerecoj


10 **Speciala**
LBV en la Universala Kongreso de Esperanto en Japanio

16 **18-jariĝo de TBV**
La celebroj de la plej vizitata monumento de Brazilja, Brazilo

22 **Okazas en la Mondo**
Socieduka agado de LBV en aliaj landoj






# Ezopo, Libero kaj Espero


**Neniu povas malliberigi la Spiriton de libera homo.**

João Preda



José de Paiva Netto, ĵurnalisto, radikronikisto kaj verkisto. Li estas Direktoro-Prezidanto de LBV.

Mi studis en Kolegio Petro la II-a, la antikva Modela Kolegio en Rio de Janeiro. Mi konservas bonajn rememorojn de instruistoj **Homero Dornelas**, asistanto de la genia **Heitor Villa-Lobos**; **Honório Silvestre**; **José Jorge**; **Newton de Barros**; **Pompílio da Hora**; **Sá Roriz**; **Farina**; **Choeri**; **Sebastião Lobo**; **José Marques Leite**; **Fernando Segismundo**, eksprezidanto de Brazila Asocio de Presarto, nia ABI; kaj aliaj tutlandaj eminentuloj.




Arkivo BV

Heitor Villa-Lobos

Tie ni studadis la paĝojn de **Ezopo, Fedro, La Fontaine**...

Kiel ĉiuj scias, fabloj estas rakontoj, en kiuj bestoj parolas, ĝuste aŭ malĝuste, saĝe aŭ arogante. Fine, ili reprezentas homojn, kun ties bonaj kaj malbonaj kvalitoj. Ezopo, greka sklavo en la insulo Samos, vivis antaŭ ĉirkaŭ tri




**EZOPO** — Artverko farita de Diego Velázquez, ekspoziciata en la Prado-muzeo (Madrido/Hispanio). Sur la bildo de la hispana pentristo, la reprezentaĵo de la greka flablisto, kiu vivis en la 6-a jarcento a.K.

Reproduktо BV

jarmiloj kaj estis ĉampiono en la arto rakonti tiujn historietojn, kiuj ĉiam instigas nin pripensi. Unu el ili estas:

## Hundo kaj lupo

*Hundo iris sur vojo. Subite, ĝi ekvidis antaŭ si lupon, kiu diris:*

*— Amiko, vi aspektas bonege! Forta, lerta, feliĉa. Mi eĉ envias vin...*

*— Ĉu vere?! Do, faru kiel mi. Havigu al vi bonkoran posedanton. Kaj vi havos nutraĵon je ĝustaj horoj kaj estos bone zorgita.*

*Mia sola tasko estas boji nokte, se aperas rabistoj. Venu do kun mi kaj li simile prizorgos vin.*

*La lupo konsideris, ke la propono estis tre bona, kaj akompanis la hundon survoje al la hejmo.*

*Ĝis momento, kiam detalo vekis ĝian atenton.*

*— Kio pendas de via kolo? Ĉu vi vundiĝis?*


*— Nu... – respondis la hundo – tio estas ĉirkaŭkolo.*

*— Kio?! — la lupo ekmiris...*

*— Dum la tago, mia mastro min ligas per ĝi. Li ne volas, ke mi timigu la homojn, kiuj vizitas lin.*

*Aŭdinte tion, la lupo jam ne emis babili kaj forlasis la hundon mezvoje, sed antaŭe ĝi diris:*

*— Amiko, forgesu ĉion, ĉar mi jam ne sekvos vin. Mi preferas vivi libere ol ĉe via ŝajna abundo.*


Arkivo BV
Lavoisier

## Moralo de la rakonto

Ne ekzistas sufiĉa kvanto da oro, kiu valoras same kiel libero.

Kaj tiel la saĝa helena filozofo, kiu estis mense libera, kvankam li suferis la fian sklavecon, lasis al ni, inter aliaj, ĉi tiun grandan instruon.

Oni diras, ke lia sinjoro, mirante pri lia grandega saĝo, donis al li liberigan leteron.

## La Instruo de Jesuo

La instruo de Jesuo estas pli alta ol tiu de la fablisto. Ĝi troviĝas en la Evangelio, laŭ **Johano**, 8:32: *"Vi scios la Veron* (de Dio), *kaj la Vero* (de Dio) *vin liberigos."*

Jen estas la diferenco – la vero de homoj ĝenerale trompas ilin, ĉar foje ĝi estas nur Racio, kiu povas esti malsama, laŭ plej diversaj faktoroj, inkluzive tiujn de malproksimeco, malgraŭ la senlima tutmondigo. La vero de Dio, ĉar ĝi estas Racio surbaze de justeco kaj firme sur Amo, do for de fanatikeco aŭ ŝtonaj konvinkoj, altigas ilin al plej ampleksa klarigo, eĉ rilate al plej kaŝitaj duboj, kaj premias ilin, kiam ili estas paciencaj kaj obstinaj, per emancipiĝo kiu evitigos al ili, poste, plej malĝojajn elreviĝojn. Tio okazis al famaj pensuloj, kiuj vidis siajn konvinkojn skuitaj, aŭ eĉ detruitaj, pro la fiasko de ideologioj brilaj sed senefikaj. Tamen, kiel klarigis **Lavoisier** (1743-1794): *"En la Naturo nenio perdiĝas, nenio kreiĝas, ĉio transformiĝas".*

Neniu kulpas, estante kredanto aŭ ateisto, se li deziras ĉiusence la plejbonon por sia popolo.


Fernando Franco
José Santiago Naud

## Espero neniam mortas

Antaŭ kelkaj jaroj, en Rio de Janeiro, mi vidis, kiam junulo diris per la televido, ke *"Espero mortis"*. Mi ne estas poeto. Sed mi prenis la skribilon kaj aŭdacis verki ĉi tiujn simplajn, senpretendajn versojn, kiujn poste muzikigis muzikreĝisoro **Vanderlei Alves Pereira**:


La Espero  
neniam mortos!  
Neniam!  
Neniam mortos!  
Ĉar kiel vivo,  
eterna flamo,  
patrina amo,  
povas do morti?!  
Ĝi ne mortos  
nepre!  
Ne mortos for  
Espero en nia kor'!

Certe tia espero ankoraŭ subtenas la koron de multaj angolaj infanoj. Diplomato, amiko de mia samideano pri ekumenisma idealo **José Santiago Naud**, kunfondinto de Universitato de Brasília, sukcesis admiri ilin je ilia naiva gajeco, malgraŭ la milito, kiu sangmakulis la patrujon de **Agostinho Neto** (1922-1979) dum preskaŭ tridek jaroj.


Arkivo BV
Agostinho Neto

*— Kiam la amiko revenis post vojaĝo en la landinterno, li diris, ke proksime al Luanda, li kun emocio vidis, ke grupo el cento da ili kantas ĉirkaŭ mizersalajra instruisto, kiu dancadas:*

*— Se mi povus, mi ekflugus*  
*por atingi nian pacon,*  
*mi forlasus la militon,*  
*mi starus apud la paco.*


Reprodukto BV
Gandhi

Libero kaj espero estas du sentoj, kiujn la homo ne povas malhavi. Li tamen devas honori la unuan por daŭre meriti havi la duan.

Neniu malliberigas la spiriton de libera homo. Tion dirus **Gandhi**, kiu verkis multajn el siaj plej belaj kaj decidaj paĝoj dum li suferis enprizonigon pro batalado por la liberigo de hindoj. ■



**Aliru:**
**www.bonavolo.com**

## Esperantistoj el Afriko skribas al LBV

Pri LBV mia impreso estas la plej bona. Ĉio igas min admiri la organizon; mi respekteplene gratulas ĝian fondinton kaj anojn. Pro ĝia senlaca klopodado favore al la homo, pro ĝiaj senlima kaj senĉesa, sed sindonema lukto kontraŭ malsato kaj mizero, pro ĝia vigla agado favore al la homaro, mi genuiĝas ĉiumomente, kiam mi pensas pri vi, kiam mi vidas LBV-n. Nenio pli gravas ol esti sincera kaj ami la proksimulon, iri al li kaj servi al li materie kaj spirite, per edukado cele al materia helpo, al vestado. Ne ĉiuj faras la samon, ne ĉiuj societoj atingas tian nivelon de LBV. Bonvolu akcepti mian kormildan vidmanieron, miajn apartajn sentojn pri la laboro de LBV.

Danke al tiu amagado ĝi sendistinge etendas siajn malavarajn manojn al ĉiuj, portante novan inspiron por igi nian vivon inda, bela, ĉarma kaj kuraĝa. ***(Jean-Marie Mboge Mbele, Kamerunio)***

Mi regule vizitas la retpaĝaron de LBV, en la franca kaj esperanta. Ĝi estas tiel interesa ke mi ŝatus estis nun en la Templo de LBV preĝante. Ĝia enhavo estas riĉa, interesa, profunda kaj spiritualeca. Tiaj ideoj indas disvastiĝi tra la mondo, en mia lando. ***(Jean Bosco Malanda, Kongo)***

**Sendu ankaŭ Vi mesaĝon al LBV:**

**esperanto@bonavolo.com**



Viviam Ribeiro

## Esperantistoj el Pollando en LBV de Rio-de-Ĵanejro

La Eduka, Kleriga, Komunuma Centro de Legio de Bona Volo, de la urbo Rio-de-Ĵanejro, akceptis, la 30-an de Novembro, la viziton de la geedza paro **Erika** kaj **Roman Dobrzyński** (sur la foto, kun infanoj de LBV) , ĵurnalistoj kaj aktivaj membroj de la pola E-movado. La du estis emociaj pro la estimo de la infanoj, kiuj donacis al ili la identigilon de LBV. Per intervjuo al la revuo BONA VOLO, ili parolis pri la iama amikeco kun la Institucio, kaj D-ro Roman elstarigis, ke, dum li aŭskultis la etulojn kantante *Lá vem Jesus!* [Venas Jesuo!], verkita de la profesoro **Darcy Augusto Malheiros**, li rememoris pri la unua fojo, kiam li vizitis la Institucion, en 1989, okaze de la inaŭguro de la Templo de Bona Volo (TBV): *"Kiam mi estis ĉi tie en Rio-de-Ĵanejro pli malpli antaŭ 20 jaroj, do tiam mi aŭdis la tutan grupon de LBV-anoj kanti ĝuste tiun kanzonon "Lá vem Jesus!". Do mi estis tiel emocia; la kanto tiel plaĉis al mi, ke mi post dum tuta nokto ne povis dormi, ĉar la kanto senĉese kantis en mia kapo. Estas tre bela kanzono, kaj mi tre ĝojas, ke ĉi tie infanoj kantis al mi, rememoris al mi tiun ĉi belan kanzonon".*

## 2a Kongreso de Esperanto de Ŝtato San-Paŭlo

La *Escola Municipal Dom Luis do Amaral Mousinho* (urba lernejo), en Ribeirão Preto/SP, Brazilo, gastigis la 2-an E-Kongreson de Ŝtato San-Paŭlo, al kiu Legio de Bona Volo estis invitita partopreni kaj disvastigi iliajn publikigaĵojn tradukitajn al la internacia idiomo.

Okaze la Vicprezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, D-ro **Paulo Sergio Viana**, reliefigis la agadon de Legio de Bona Volo (LBV) kaj de ĝia Direktoro-Prezidanto, José de Paiva Netto: *"Mi sentas min honorigita ĉar mi tradukis kelkajn artikolojn de Paiva Netto, kaj mi plezure kaj kontente faris tion, tial ke ili estas altnivelaj; ili kontribuas al la Monda Paco, al Ekumenismo. (...) Estis kun granda ĝojo kaj honoro, ke mi ricevis tian inviton kaj mi donas mian kunlaboron al tiu bela agado de LBV".*



Meze, **D-ro José Passini**, Prezidanto de Brazila E-Ligo, **Alexandra Beck** kaj **Adelar Pereira**, reprezentantoj de Legio de Bona Volo.

Ankaŭ ĉeestis la eventon la Prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, D-ro José Passini, kiu per intervjuo al la Supera Reto Bona Volo pri Komunikado, elstarigis: "*La agado de LBV por Esperanto estas bonega. Mi jam vizitis la Templon de Bona Volo en Brazilja. Mi taksas tre bona afero, ke Institucio kiu faras la Bonon alprenas Esperanton".*



# Tutmondaj Partnerecoj

El Ĝenevo/Svisio, **Danilo Parmegiani**, reprezentanto de Legio de Bona Volo (LBV) ĉe UN, raportas, ke – "Kutimiĝintaj, bedaŭrinde, ofte vidi nian karan landon montrata kun reliefo laŭ negativa aspekto, ĝenerale pro perforto, kiu ŝokas, tamen estas tre pozitive, kiam brazilanoj atingas elstarecon pro plej bonaj kvalitoj. Kaj tio okazis inter la 2-a kaj 5-a de julio, kiam LBV reprezentis — kiel Organizo kun konsulta statuso ĉe la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro (Ecosoc) de Unuiĝintaj Nacioj ekde 1999 — Latinamerikon en la plej grava kunsido de tiu organo: *High-Level Segment 2007,* ĉe *Palais des Nations,* nome la ĝenerala sidejo de UN en Ĝenevo.

"Invitite de Unuiĝintaj Nacioj, LBV prezentis sian sperton pri socieduka agado farata jam de preskaŭ 60 jaroj, origine kreita en Brazilo, kaj ankaŭ la rezulton de la 1-a Foiro de Novaĵoj Reto Solidara Socio, organizita de LBV kaj UN, okazinta en marto, en Brazilo kaj en Latinameriko, kun partopreno de 1124 organizaĵoj el tiuj regionoj. La foiro havis kiel temon 'Tutmondaj partnerecoj por evoluigado — Plifortigi penadon por forigo de malriĉeco kaj de malsato', kun apogo de UN/Desa kaj de Informcentro de Unuiĝintaj Nacioj en Brazilo (UNIC-Rio)".

"La kunsido en Ĝenevo havis la noblan taskon disvastigi agadon, kiu kunhelpas memsubtenan evoluiĝon kaj plibonigon de vivkvalito en la planedo, per komuneco inter civila socio, ŝtatestroj, ministeriaj konsilantoj kaj alta komitato de UN, por ke taŭgajn praktikajn farojn oni multobligu, por ke oni realigu la novajn sociajn teknologiaĵojn kaj la intersektorajn strategiojn, cele al la ok Celoj por Evoluigo en la Jarmilo, precipe koncerne la forigon de malsato kaj malriĉeco.

"La malferman ceremonion kondukis la Ĝenerala Sekretario de UN, **Ban Ki-moon**, kaj ĉeestis reprezentantoj de 192 ŝtatoj-membroj de Ecosoc. Post tiu programero, la Sekretario vizitis la ekspozicion de laboraĵoj de la ĉeestantaj institucioj. Ĉe la budo de LBV, li atente observis la panelojn, kiuj montris fotojn kaj raportojn pri sukcesaj faroj de la brazila organizo, li ĝuis la plurtemajn pentraĵojn kaj akceptis la revuon *Tutmondigo de la Frata Amo* (komence eldonitan en la portugala, angla kaj franca lingvoj), kiu prezentas la mesaĝon de Paiva Netto, kaj kiun speciale atentis la ĉeestantoj. Ban Ki-moon, okaze de la renkonto kun LBV, subskribis la kovrilon de la eldonaĵo, konfirmante sian apogon al la agado entreprenata de Legio de Bona Volo. D-rino **Hanifa Mezoui**, estro de la departemento pri NRO-j de UN/Desa, akompanis la Sekretarion dum la vizito.

"La kvaran de julio, nome de LBV, **Conceição de Albuquerque**, kiu nuntempe doktoriĝas pri edukado, paroladis ĉe la asembleo de *High-Level Segment* gvidita de la Viceprezidanto de Ekonomia kaj Socia Konsilantaro, S-ro **Hilario Davide**. La prezento al la ŝtatestroj resumis la raporton de LBV, kies rekomendoj estis tradukitaj de UN mem al ties ses oficialaj lingvoj. (La tuton oni povas trovi en la paĝaro www.redesociedadesolidaria.org.br).

"Post la parolado de la edukistino, entuziasme akceptita de la publiko, D-ro Hilario komentis: *'Potenca estas la mesaĝo de LBV. Nur per tutmondigo de amo, laŭ ĝia plena senco, oni havos pacon, progreson kaj prosperon por la tuta homaro.'*

"D-rino **Michelle Billant-Fedoroff**, adjunkta estro de la sekcio de NRO-oj de Ecosoc, sendis specialan




Eduarda Pereira

Reprezentantoj de LBV, de maldekstre dekstren: **Noys Rocha** (Portugalio) , Conceição de Albuquerque (Usono) kaj **Rosana Bertolin** (Brazilo), kun la revuo de LBV. Meze la Ĝenerala Sekretario de UN, Ban Ki-moon, kaj je la dekstra flanko aperas S-ino Hanifa Mezoui, ekstrino de la departemento pri NRO-oj de UN/DESA.



Danilo Parmegiani

La Ĝenerala Sekretario esprimis sian apogon al laboro de LBV, subskribante la kovrilon de la revuo *Globalization of Fraternal Love*.

mesaĝon al la estro de la Institucio: *'Sinjoro Paiva Netto, mi venis pro vi al Ĝenevo, por konatigi vin al la Ĝenerala Sekretario de UN, Ban Ki-moon, kiu estis informita pri la eksterordinara agado, kiun vi plenumas en Brazilo. Li konas vin kaj vian grandan Organizon kaj kuraĝigis vin al plua agado, nun bone konata en la mondo.'*

"En la unuaj tagoj de la evento, gravaj aŭtoritatuloj ĉeestis ĉe la budo de LBV, kiel la Ambasadoro de Hindio en Svisio kaj Vatikano, S-ro **Amitava Tripathi**, kiu venis speciale el la urbo, kie li loĝas, Berno, por renkonti la anojn de LBV, kaj tiuokaze li esprimis sian entuziasmon pri la revuo *Tutmondigo de la Frata Amo. 'La agado de LBV estas tre grava por la plenumiĝo de la Celoj por Evoluigo en la Jarmilo, ĉar ĝi estas grava ne nur por Brazilo, sed por la tuta homaro. Malriĉeco, malsato, manko de baza eduko estas seriozaj problemoj, kiuj koncernas ĉiujn. Por evito aŭ prevento, oni devas konsideri ilin konsekvence, diskuti ilin en tutmonda amplekso, kaj pro tio mi gratulas al LBV.'"*




Eduarda Pereira


D-ro Hilario Davide, Vicprezidanto de Ekonomia kaj Socia Konsilantaro kun la revuo *Globalization of Fraternal Love* apud Danilo Parmegiani de LBV.

La konsekvencoj de tiuj faktoj meritas de nia flanko amason da konsideroj, se oni atentas pri ilia graveco. Fine, longa vojo estas irenda, por ke oni atingu la deziratan ekumenan, altruisman, solidaran socion, en kiu "*ĉiuj homoj povu naskiĝi liberaj kaj egalaj laŭ la digneco de rajtoj*", laŭ la postulo de la Universala Deklaro de Homaj Rajtoj. ■



Conceição de Albuquerque

S-ro Amitava Tripathi, Ambasadoro de Hindio en Svisio kaj Vatikano, kun Rosana Bertolin kaj Danilo Parmegiani de LBV.




LBV prezentas siajn agadojn ĉe Asembleo de *High-Level Segment 2007.*



Eduarda Pereira

# La brilo de la internacia idiomo

Leila Marco
Fotoj: Sachi Oowada (Oomoto)
Kimio Macumoto (Oomoto)
Paulo César (LBV)

**Pligrandigas la nombron de Esperantistoj en la Planedo**





Ceremonio de malfermo de la 92a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo, Japanio.

Je feliĉa koincido, kiam prepariĝas la celebrado de la centjariĝo de la japana enmigrado en Brazilo, la venontan 17-an de julio 2008, Esperanto havas kiel sidejon de sia ĉefa evento la landon de la naskiĝanta suno. La 92a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto, analizis la intervenon de tutmondigo en la diversaj kulturoj, sub la temo *Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto.* La evento okazinta en la havena urbo Jokohamo, Japanio, kun la ĉeesto de preskaŭ du mil homoj el 57 landoj, diskutis ankaŭ la celojn de la lingvo kaj la rolon de la interreto en tiu procezo.



Unu el la enkondukintoj de la temo de la kongreso ĉe la solena inaŭguro estis **Tsuda Yukio**, profesoro kadre de la Doktoriĝo-Programo pri Modernaj Kulturoj kaj Publikaj Politikoj en la Altlernejo pri Klasikaj Studoj kaj Sociaj Sciencoj ĉe la Universitato Tsukuba, Japanio. *"Ĉi-jare mi instruis en Universitato en Kalifornio kaj diversloke en Usono prelegis pri hegemonio aŭ regado de la angla. Fakte Orionto multflanke okcidentiĝis. Ekzemple la vivstilo de ni japanoj klare montras tion. Ni alkutimiĝis manĝi kaj trinki kiel ili. Ni vestiĝas ankaŭ eŭropstile kaj loĝas eŭropstile. Tradiciaj japanaj loĝdomoj apenaŭ restas".*


Tsuda Yukio

Laŭ Yukio, *"multaj orientanoj rimarkis kiom multe ili perdis pro troa okcidentaniĝo, ili komencis rezisti kaj klopodi regajni suverenecon".*

## Tutmondigo de la Frata Amo, de Paiva Netto, furoras en la Kongreso

Legio de Bona Volo (LBV), kiu reprezentiĝis en la evento pere de **Maria Aparecida da Silva**, respondeculino de la Departemento pri Esperanto ĉe LBV, kaj pere de **Paulo César Pereira**, ankaŭ membro de la Institucio, portis sian kontribuon en formo de la revuo *Tutmondigo de la*



Bildo de kovriloj de la ekumenaj publikigaĵoj, kiuj Legio de Bona Volo portis al la esperantistoj en Japanio. Por aĉeti tiujn eldonaĵojn telefonu al (+5511) 3358-6919 aŭ sendu mesaĝon al esperanto@bonavolo.com




D-ro **Won Yong Sang**, PhD., Profesoro de Budhisma Instituto pri Esploro, de Sud-Koreio, ĉe la budo de LBV.



Profesoro **Lee Jung-Lee**, de Universitato Dankok, Wonkwan, Sud-Koreio.


> "LBV estis la kerna punkto de la demando, ĉar en la mondo, kiam oni parolas pri evoluo, oni pensas pri ekonomio, do profito, sed la bonfarto de la homoj ne dependas nur de tio; la sento pri Spiritualeco estas tre grava"
>
> **Renato Corsetti**
> Prezidanto de UEA














### KELKAJ VIZITANTOJ ĈE LBV-BUDO

(1) Reprezentantinoj de la irana esperanto-movado **Roghayyeh Reza Gholivand**, **Kolsoom Yadegari** kaj **Sousan Mohebi**; (2) la reprezentanto de LBV, Maria Aparecida da Silva (la 4-a de maldekstre dekstren) kun grupo de esperantistoj de Indonezio, Irano kaj Ĉina; (3) reprezentantoj de la E-movado de Japanio, Sud-Koreio, Hinda Unio kaj Usono; (4) LKK-membroj de la 92a UK: **Takagi Michiko, Oomori Sizuka** kaj **Sanpei Keiko**; (5) la Profesoro D-ro, PhD, de la Kawasaki University of Medical Welfare, **Hiroshi Nagata**, apud la eksprezidanto de UEA, D-ro **Renato Corsetti**.

*Frata Amo*, per kiu la Direktoro-Prezidanto de LBV, la ĵurnalisto Paiva Netto, en sia mesaĝo "Ok Celoj por la Jarmilo", vigle pledas por ke ia pli nobla sento estu la perfekta instrumento en la dialogo inter la popoloj: *"En la internaciaj rilatoj, Amo, Solidareco kaj Frateco estas rigardataj iel teknike. Tio ja ne funkcias. La afero bezonas estiĝi en la koroj de la gentoj (...)"*. La dokumento de la gvidanto de la Institucio estis antaŭe liverita al Ŝtatestroj kaj kromaj reprezentantoj de tiuj landoj kiuj konsistigis la plej gravan kunsidon de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de Unuiĝintaj Nacioj (Ecosoc), nome *High-Level Segment 2007* okazinta en Ĝenevo, Svislando (reporto sur paĝo 8).

Krom tiu ĉi publikigaĵo, ankaŭ la revuoj *Bona Volo*, *Solidara Socio*, *Paco por la Jarmilo,* informfolio pri la Templo de Bona Volo kaj la porinfanaj libroj *Ruĝa Fiŝeto* kaj *La mallaborema formiko* restis je la dispono de la publiko en la budo de LBV. La



Profesoro **Humprey Tonkin**, emerita Prezidanto de Universitato de Hartford, Usono, kun la reprezentantino de LBV.



Ĉe la mikrofono **Enkhee Chimedtseren**, Ĝenerala Sekretario de Mongola Esperanto-Socio, apude **Agou Takaŝi**, Direktoro de Esperanto-Popularigo Asocio, de Kameoka, Japanio.

budo iĝis renkontiĝejo, kadre de la evento, pro la diverseco de eldonaĵoj kaj pro la fakto ke la Organizo ĉeestas en pluraj partoj de la Planedo, dissendante sian fratecan kaj ekumenan mesaĝon per la helpo de la internacia lingvo.

La tiama Prezidanto de UEA, la itala **Renato Corsetti**, okaze de sia parolado reliefigis la valoron de Esperanto kiel ponto inter la regionaj kulturoj de la mondo, la eŭropa/usona, islama, orient-azia, sudamerika i.a.. *"Unesko mem kaj multaj ne-esperantistoj iĝas sentemaj pro la danĝera malapero de lingvoj kaj kulturoj"*, li komentis.

D-ro Renato, leginte la revuon *Tutmondigo de la Frata Amo*, diris, ke LBV estis la kerna punkto de la demando, ĉar *"en la mondo, kiam oni parolas pri evoluo, oni pensas pri ekonomio, do profito, sed la bonfarto de la homoj ne dependas nur de tio; la sento pri Spiritualeco estas tre grava"*. Kaj li kompletigas sian rezonadon: *"Estas grave pensi kiel Legio de Bona Volo, kunlabori kun tiu Institucio cele al la spirita progreso"*.

Profesoro Corsetti substrekis, ke la esperanta movado kreskas rapide en Latinameriko, speciale en Brazilo, kaj ke li deziras reveni al nia lando por speciale viziti la Templon de Bona Volo en Brasília, ĉefurbo de Brazilo.

Alia homo kiu vidas ĉe ni brazilanoj provizejon de valoraĵoj estas la itala samlandano **Ranieri Clerici**, Vicprezidanto de


## Civitaneco kaj Edukado

**Ursula Grattapaglia**, kiu de multaj jaroj faras socian kaj edukan laboron kun brazilaj infanoj en la bieno Bona Espero, situanta en la urbo Alto Paraíso de Goiás/GO, dankis al la Institucio pro la iniciato porti Solidarecon kaj reciprokan respekton: *"LBV flegas Esperanton kiel rimedon por edukado de la tutmonda civitaneco. Mi deziras, ke ĝi daŭre sentu sin motivigata sentebligi la novajn generaciojn. Ni ricevis la porinfanajn librojn de LBV kaj la infanoj (de Bona Espero) legas ilin kun miro, ĉar temas pri belaj publikigaĵoj kiuj vekas scivolemon. Gratulon!"*.




## Ekumena Mesaĝo de LBV en Irano

Ankaŭ la iranano **M. Reza Torabi**, redaktoro de la revuo Irana Esperantisto kaj Prezidanto de la Irana Esperanto-Asocio, rakontis ke antaŭ ok jaroj li konatiĝis kun LBV pere de filmraporto, informiĝis pri la Institucio kaj de kelkaj monatoj ĝin reliefe afiŝas en sia retejo, en la oficiala idiomo de sia lando, la persa, por ke liaj samlandanoj povu iom pli ekkoni la penson da la Organizo: *"Plezure mi tradukis kelkajn informojn al la persa, disponigis ligilon kaj afiŝis en mia blogo la Portalon de LBV (bonavolo.com). Kiel esperantisto, tre plaĉis al mi la fakto ke LBV apogas Esperanton kaj ĝin uzas kiel laborlingvon. Tio vere plaĉis min. Mi deziras sukceson kaj ĉion bonan al vi. Dankon"*.



M. Reza Torabi


Andrzej Grzebowski, Prezidanto de Programa Konsilio de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo, de Pollando, kun la reprezentantino de LBV.


**Shiguang**, respondeculo pri Turisma Fako de Ĉina Esperanto-Ligo


Speciala momento: alilandaj vizitantoj kaj enlandanoj donace ricevis kaj uzis la tradician japanan jukaton (someran kimonon). En la okazo ili eklernis la paŝojn de sankta dancarto de Oomoto nomata Miroku-danco (Miroku = Ideala Mondo), realigita en belega loko ĉirkaŭata de centjaraj plantoj kaj arboj, en la monda sidejo de Oomoto en Kameoka, Japanio.

UEA. Li komentis pri la iniciato de LBV instrui la lingvon al novaj generacioj: *"Vi akceptas la infanojn kun amo, donas la panon, ĉion kion ili bezonas por vivi; vi ricevos de ili la konfidon por la instruado de Esperanto. Vi eble ne tuj povos rapide vidi la utilon de tiu laboro, sed iu tago la idiomo estos tre utila al tiuj geknabetoj, inkluzive por la kompreno de la mondo"*.

## Favore al Paco

Reliefigante tion kion Ranieri asertis koncerne al la kompreno pri la aspiroj de aliaj kulturoj, la ĵurnalisto **Razen Manandhar**, Prezidanto de la Nepala Esperanto-Asocio, raportis kiel la publikigaĵo *Paco por la Jarmilo* impresis lin: *"Ĉio allogis min, ĉar en Nepalo, dum jardekoj, ni soifadis por Paco. Pro militoj ni perdis pli ol 30.000 homojn, kaj kiam ajn mi vidas iu ajn laboron por la Paco, tio donas al mi feliĉon, kaj tio montras, ke homoj vere amas Pacon"*. Razen deziras traduki al sia regiona idiomo, la nepala, artikolojn de la gvidanto de LBV kaj disponigi ligilon al la retejo de la pritema Institucio en Esperanto.


Razen Manandhar

Multaj aliaj renkontiĝis kun la Legianoj, ekzemple s-ino **Terezija Kaptista**, el Serbio, kiu antaŭ kelkaj jaroj konatiĝis kun la Institucio, en la subŝtata ĉefurbo San-Paŭlo, kaj s-ro **Andrzej Grzebowski**, el Pollando, kiu deziras diskonigi la mesaĝon de LBV pere de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo kiu tenas kontakton kun pli ol 180 landoj kaj interagadas kun la Akademio Internacia de la Sciencoj de San-Marino, Italio.

Se juĝi laŭ la vigleco de la Internacia Idiomo, eblas prognozi ke ĝi havas brilan vojon antaŭ si, kaj ke la sekva internacia renkonto de la parolantoj de Esperanto en 2008, en la nederlanda urbo Roterdamo, promesas bonajn okazojn.



## Pollando kaj Germanio

Alia kongresano kiu indentiĝis kun tiuj fratecaj idealoj estis la profesorino **Alicja Sakaguchi**, kiu lekcias en universitatoj de Pollando kaj Germanio. Ŝi akiris la publikigaĵojn de la Institucio por diskuti kun siaj gelernantoj pri la temo *Karitato* surbaze de la beletraj tekstoj de Paiva Netto.




Meze la Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto, Kurenai Deguĉi, inter la gereprezentantoj de LBV, Maria Aparecida da Silva kaj Paulo César Pereira. Reliefe la momento dum kiu ili donacis al S-rino Kurenai





La reprezentantoj de LBV kun la grupo de brazilanoj en Ajabe. Antaŭe la sinjorino Kurenai Deguĉi kaj la Profesoro Ŝigeki Maeda.

# LBV partoprenas en ceremonioj de Oomoto en Ajabe kaj Kameoka

Akcepte de la ĝentila invito de Oomoto, religio fundamentita sur la tradicia japana kulturo, kun ŝintoaj ritoj, la reprezentantoj de Legio de Bona Volo kaptis la okazon plilongigi sian itineron dum pliaj ses tagoj per vizito al la urboj Ajabe kaj Kameoka en la gubernio Kioto, Japanio, cele partopreni en la aranĝo "Bonvenon al Oomoto en 2007".

Distingo pri la du aranĝoj, okazintaj je la 12-a kaj 13-a de aŭgusto, kun la partopreno de la Kvina Spirita Gvidantino **Kurenai Deguĉi** en la granda Templo Ĉoosej-den en Ajabe, Japanio. La reprezentantoj de LBV, nome de ties gvidanto, Paiva Netto, salute regalis la Majstrinon per la revuo *Tutmondigo de la Frata Amo*. Je la sekva mateno, la honorinda Kurenai ilin ricevis en sia kabineto kaj estis regalata per distingaĵo kaj arta repliko de la Templo de Bona Volo.

Ankoraŭ je la 13-a tago la Legianoj kunpartoprenis en la Porinfana kaj Junulara Kongreso de Oomoto, kie kunvenis centoj da infanoj kaj gejunuloj el ĉiuj regionoj de Japanio; tie ili renkontiĝis kun esperantistoj el Brazilo kaj pluraj aliaj landoj, kiel Bulgario, Germanio, Francio, Italio, Svislando, Israelo, Usono, Pollando, Nederlando, Ĉinio, Suda Koreio kaj Mangolio. Paulo César Pereira, el LBV, kunlaboris kiel cerimoniestro de la evento, prezentante en la okazo al la ĉeestantoj resumon pri la aktivadoj de la Institucio.

Pri la 15-a de aŭgusto, vizitante la grandan Templon Banŝooden, en Kameoka, LBV estis prezentita al la 500 oomotanaj gejunuloj partoprenantaj en Kongreso, per helpo de profesoro **Ŝigeki Maeda**, Direktoro de Oomoto Internacia, kies sidejo situas en Brazilja, Brazilo. Ĉiuj grupoj de oomotanaj gejunuloj estis regalataj per la publikigaĵoj de LBV en Esperanto. Ili montris sin tre ĝojaj akcepti la brazilan Organizon, emocie aplaŭdis la paroladon kaj dankis esperante: *Elkore dankon!* ■

*Kunlaboris: Maria Aparecida da Silva kaj Paulo César Pereira*

**18-jariĝo de TBV**

La celebroj de la plej vizitata monumento de Brazilja

# PACA OAZO



Ekumena ensemblo de LBV konsistanta el ParlaMundi (M), administra sidejo (C) kaj Templo de Bona Volo (D). Adreso: Brasília/DF, Brasil (Brazilo) – SGAS,915, Lotes 75/76. Tel.: (+5561) 3245-1070.

El la Redakcio

En malfrua posttagmezo de la 27-a de oktobro 2007, homamaso kunvenas ĉe la Templo de Bona Volo (TBV), en Brazilja/DF, kaj fervore atendas la paroladon de José de Paiva Netto. Tiuj momentoj heroldas la kulminon de la celebroj de la 18-a datreveno de TBV. La atendadon de la publiko oni tuj kontentigas. Tamen, antaŭe, sur la grandega ekrano (6 x 4,5 m) per kiu li parolos, metita sur la navon de la Templo, ekaperas antikva sceno, registrita ankoraŭ per nigrablanka filmo, kiu montras elsendon de 1967, kiam la karmemora fondinto de la Institucio, **Alziro Zarur** (1914-1979) rememorigis maksimon de **Markizo de Maricá** (1773-1848): "*Bona Volo estas ia firma briko, kiun ĉiu homo povas donaci por la konstruaĵo de komuna progreso.*" Kaj Zarur aldonas per sia belsona voĉo: "*Ne ekzistas pli bona argumento ol Bona Volo: ĝi estas certe la plej granda forto de Vivo*".

Tuj poste, alia historia bildo,

# Emociplena kaj Ekumenkultura festo celebras 18 jarojn de la Templo de Bona Volo



André Fernandes



Lucian Fagundes

Per granda ekrano metita ĉe la navo de TBV, homamaso akompanas la paroladon de Paiva Netto.

senmortigita je la 21-a de oktobro 1989, okaze de la inaŭguro de la monumento, montras Paiva Netto, kiam ĉi tiu dankas ĉiujn, kiuj iel helpis la konstruadon de TBV, "*konsciaj, ke Legio de Bona Volo estas ia oferlaboro*". Por kompletigi la scenon, li rememorigas la promeson liveri al la popolo tiun nelimigitan ekumenan Templon,

Daniel Trevisan



La publiko koncentriĝis por preĝoj kaj meditado.

André Fernandes



La ekspozicio "La sep aspektoj, kiuj montras Dion" ĉe la Artgalerio de TBV venigis ankoraŭ nemontritajn fotojn pri la monumento, por ĝuo de la publiko.

okaze de la 10-jara datreveno de la tago, kiam Zarur revenis al la Spirita Patrujo, kio fakte plenumiĝis tiun tagon. Tiuj rememoroj tre emociis la ĉeestantojn kaj grandstile malfermis la unuan aŭdvidan elsendon per satelito al la salono.

De tiu punkto, la gvidanto de LBV estris la ceremonion, parolante al la koro de centoj kaj centoj da miloj da homoj, kiuj sekvis lian parolon per Reto Bona Volo de Komunikado (televido, radio kaj interreto), kaj li asertis, ke tiu mirindaĵo, nome TBV, estas frukto de fido je Dio kaj je la Kristo de laborforto, dum al li mem restis la tasko ne retroiri: "*Vi staras ene de miraklo de firma, neskuebla volo, nome Templo de Bona Volo*".

Laŭ Paiva Netto, la sukcesa formulo uzita ĉi-okaze estas tiu sama, kiun oni vidis ĉe la ceteraj agadoj de homa kaj socia helpado ĉe la Institucio, ĉar ĉiuj naskiĝis komence en la soleca intimo de homoj kaj poste akiris al si materian formon, tiel ke nenio okazis senpene, sen granda klopodado kaj sen la kredo je plej altaj idealoj. Li ankaŭ alvokis la ĉeestantojn al antaŭenirado kune kun li al eĉ pli grandaj celoj kaj novaj direktoj. Je tio la ĉeestantaro unuvoĉe respondis: "*Ni akceptas!*"

Li asertis, ke tiu tago estas same speciala al li, pro la publikigo, per la revuo *Jesus Está Chegando!* [Jesuo Alvenas!] (eldono n-ro 98) de lia artikoloserio *Apokalipso de Jesuo al la Kore Simplaj*, kiu aperis dum la jardekoj 1990-a kaj 2000-a, kies komenca programo, el serio de 449 programoj, estis registrita antaŭ precize 17 jaroj (27-a de oktobro 1990). Tiu serio estis furore sukcesa kaj rezultis de maturiĝo de liaj predikoj pri tiu temo, ankoraŭ en la jardeko 1970-a, kaj de profunda studo lia pri la Libro de Finaj Profetaĵoj, kiun li faras jam de kvin jardekoj.


## Konkretigo de idealo

En 1984, fine de alia granda projekto, kiun li finis – nome, la transigo de la Sidejo de la Institucio de la urbo Rio-de-Ĵanejro al la ĉefurbo San-Paŭlo – li denove ekpensis pri la konstruado de TBV. Ĉe ambaŭ okazoj, li konkretigis promesojn faritajn de la fondinto de la Agado, ĉiam farante multe pli ol tio, kion oni komence antaŭvidis, kaj tio estas rara ekzemplo de homo, kiu respektas ne nur la ĉeeston de amiko, sed ankaŭ la foreston. Paiva Netto mem diras: "*Estas honorinde respekti la ĉeeston de amiko; tamen, multe pli honorinde estas respekti*

João Periotto



La Ekumena Koruso de la Religio de Dio prezentas kanzonojn el sia nova verko: KD *Mi estos unu kun Jesuo.*




> **"Oni senlace bataladas por tio, kion oni vere kredas. (...) Kaj granda, stimula idealo estas Bona Volo de Dio kaj la Nova Ordono de Jesuo, la Ekumena Kristo, ipso facto, sen restaĵoj de netoleremo".**
>
> **Paiva Netto**

*foreston de li. Ekzemple: promeso farita de Alziro Zarur estas ia promeso mia".*

Temas pri nemalhavebla leciono, kiu plifortigas la respondecon de legianoj de Bona Volo, precipe de la nova generacio. Nome, antaŭenporti la standardon tenitan de Zarur, okaze de predikado pri la Nova Ordono de la Kristo, kaj elvolvi la proponojn de Paiva Netto, kiel tiun pri Akademio Jesuo, la Ekumena Kristo; pri Monda Forumo Spirito kaj Scienco; pri Instituto de Studoj pri Scienco de la Animo, pri Forumo Dio: Kiu aŭ Kio?, pri la Pedagogio de Ekumena Civitano, pri Solidara, Altruisma, Ekumena Socio, kaj aliaj.

Li mallonge parolis pri la maniero, kiel la konceptado de la Templo maturiĝis en lia koro. Lia unua paŝo, raportis la estro de LBV, estis aliro al la plej proksimaj administrantoj kaj aŭskultado al la Konsilantaro de la Institucio. Kaj dum la "10-a Kongreso de Legian-virinoj", okazinta en Belo Horizonte /MG, je la 25-a de majo 1985, li proponis al la ĉeestantoj la defion konstrui TBV-on, kion oni tuj akceptis.

Memkompreneble, same kiel ĉe aliaj entreprenoj de la Institucioj de Bona Volo, ankaŭ ĉi tiu postulis grandan penadon. "*LBV estas ia vojo por kuraĝuloj",* li elstarigis, kiam li komentis la parafrazon, kiun li faris pri la penso de Mahatmo Gandhi (1869-1948), ĉar laŭ li ĝi kongruas speciale kun tiuj bataloj de la Institucio. Kaj li kompletigis: "*Gandhi diradis ankaŭ, kiam li aludis al grandaj bataloj: 'Komence oni ĝin ignoras, poste oni ĝin ridindigas, sekve oni ĝin kontraŭbatalas, kaj fine vi venkos' "*

Kaj la estro de LBV finis: "*Oni senlace bataladas por tio, kion oni vere kredas. (...) Kaj granda, stimula idealo estas Bona Volo de Dio kaj la Nova Ordono de Jesuo, la Ekumena Kristo,* **ipso facto,** *sen restaĵoj de netoleremo".*

## Idealo pri Bono

Dum sia prelego, li substrekis la gravecon de tio, ke "*viroj, virinoj, gejunuloj, infanoj kaj Spiritoj, kiuj asertas, ke ili akceptis Bonon, tiuj efektive estu tiaj".* Koncerne tion, li rememorigis sian mesaĝon, kiu kuŝas jam ĉe la enirejo de la ĉefa salono de Monda Parlamento de Ekumena Frateco, nome Parlamundi de LBV, alia iniciato lia, starigita apud la Templo de Bona Volo: "*Kiam teritorio ne estas defendata de bonuloj, tiam malbonuloj igas 'justa' la venkon de maljusteco".*

Fine de sia rezonado, li komentis, ke ĉiuj, kiuj partoprenis

Clayton Ferreira



João Periotto



La Junula Teatro-ensemblo LBV ludas la dramon *Mistero pri Dio Revelaciita,* inspiritan de la samnoma muziko de komponisto Paiva Netto.

en la konstruado de Templo de Bona Volo estas iaj herooj, kaj ke estis glore vivi tiutempe, kiun multaj homoj volus ĉeesti.

## Templo de Bona Volo celebras sian 18-an jaron

Ĉiujare, la monaton oktobro oni dediĉas al celebrado de la datreveno de inaŭguro de Templo de LBV (je la 21-a de oktobro 1989). TBV estas la plej vizitata monumento en Brazilja, laŭ statistiko de Ŝtata Sekretario por Ekonomia kaj Turisma Elvolvado (SDE) en la Federacia Distrikto, kaj ĝi ĉiujare akceptas pli ol unu milionon da homoj. Vizitantoj emas senti tie nelimigitan Ekumenismon, nome idealon, kiun reprezentas ĉiu detalo de la ĉambroj, kiuj konsistigas tiun prestiĝan arkitekturan konstruaĵon en la brazila ĉefurbo.

En 2007, vastan programon oni organizis speciale por la celebrado. Inter la allogaĵoj troviĝis recitaloj, teatraĵoj, artaj ekspozicioj, orkestroj, solenaĵoj, k.s..

Ĉe Templo de Benataj Animoj, je la 21-a tago, Ekumena celebro kunvenigis reprezentantojn de diversaj partoj de la socio, kaj ĝin kondukis Ministro de Religio de Dio, **Jayme Bertolin**. Plenkreskula kaj infana korusoj de TBV kaj de Mokiti Okada, de Monda Mesiana Eklezio en Brazilo, kaj ankaŭ la kantistino **Janete Dornellas,** beligis la eventon. Ĉiu partoprenanto alportis simbolan objekton, kiu ĝin reprezentis, kaj lasis ĝin ĉe la navcentro. Je tiu sama dato oni celebras la Tagon de Ekumenismo, omaĝe al Templo de Bona Volo, kiel proponis la eksa Federacia Deputito **Rodrigo Rollemberg**.

Ekumena Koruso Religio de Dio rolis en alia grava okazaĵo, kiam ĝi prezentis al la publiko sian plej novan verkon: KD *Serei um com Jesus* [Mi estos unu kun Jesuo]. La verko proponas komponaĵojn inspiritajn de instruoj kaj ekzemplado de la Ekumena Kristo.

## Tra la antaŭa pordo

Laboristoj, kiuj konstruis la Mondan Parlamenton de Ekumena Frateco, alia verko naskita per mirakla obstino, havis agrablan surprizon, laŭ raporto al ni farita de reprezentanto de LBV en Eŭropo, Noys Rocha, kiu tiutempe loĝis en la federacia ĉefurbo. Ŝi rememorigas, ke ĉe la Sektoro de Studentoj, ĉe Parlamundi, Paiva Netto donis al ĉiu el ili po unu Kristnaskan korbon. Kaj Noys kompletigas, rememorante pri la okazaĵo: *"Tiam, resume, li diris: 'Ĝenerale oni memoras pri laboristoj en la momento starigi monumentojn kiel ĉi tiun, aŭ palacojn, aŭ grandajn konstruaĵojn el apartamentoj. Dum ili konstruas ilin, ili eniras tra la antaŭa pordo. Poste, aŭ ili ne plu eniras, aŭ ili eniras tra la malantaŭa enirejo. Ne ĉi tie. Ĉi tie, vi, fratoj laboristoj, estos ĉiam digne akceptataj tra la antaŭa pordo. Ĉi tien viaj gefiloj povos veni kaj aliri informadikajn rimedojn, datumbankon, bibliotekon. Ili povos atingi la samajn informojn kiel la gefiloj de tiuj, kiuj povas pagi studadon ĉe universitatoj'"* .

Ricardo Ribeiro



Noys Rocha

# Leĝodona Konsilantaro de la Federacia Distrikto omaĝas Templon de Paco


Roosevelt Caetano

Gilberto Amaral

Je la 26-a de oktobro 2007 vespere, la Leĝodona Konsilantaro de la Federacia Distrikto omaĝis TBV-on, kiun la veterana ĵurnalisto **Gilberto Amaral** oportune nomas Templo de Paco. Speciala Solena Sesio okazis ĉe la Monda Parlamento de Ekumena Frateco, nome Parlamundi de LBV, celebre al la 18-jariĝo de TBV. *"Pli ol omaĝo, ĉi tiu sesio esprimas apogon de la Konsilantaro al unu el la brazilaj institucioj plej elstaraj"* komencas la proponinto de la omaĝo, distrikta deputito **Aylton Gomes.**


Lucian Fagundes

La gedeputitoj Érika Kokay kaj Aylton Gomes

Distrikta Deputito Aylton Gomes: *"Mi pensas, ke estas devo de ĉi tiu Leĝodona Domo laŭdi tiun, kiu abnegacie montras obstinon kaj sindediĉon al la noblega tasko helpi niajn similulojn. Sed tiu devo fariĝas plezuro, kiam ni omaĝas geamikojn el Legio de Bona Volo, indajn je respekto, admiro kaj Solidareco. Sekve, kun grandega plezuro, mi gratulas ĉiujn partoprenantojn de tiu mirinda Institucio, je la persono de prezidanto Paiva Netto kaj de ĉiuj ties partoprenantoj, kiam, dum ĝeneralaj aplaŭdoj, LBV atingas unu plian jaron da ekzistado".*

*"Legio de Bona Volo plenumas sian agadon tra la tuta Brazilo, sen ia politika aŭ partieca inklino, sen ia tujprofita intenco, tial ĉi tiu Leĝodona Konsilantaro rekonas kaj proklamas ties valoron. LBV faciligas al la registaroj nekredeblajn helpojn en socia kampo, kiel asistadon al senhavaj infanoj ĉe modelaj lernejoj. Mi prezentas al mi kio okazus, se ni ne havus tiun altvaloran kontribuon de LBV"*, kompletigis la deputito.

Ankaŭ ĉeestis la sesion la distrikta deputitino **Érika Kokay,** de kvar jaroj prezidanto de la Komisiono pri Homaj Rajtoj, kaj ŝi parolis pri la graveco de TBV. *"Ni ŝuldas al tiuj viroj kaj virinoj, sub la kunordigo de Frato Paiva Netto, la eblecon havi ejon malfermitan dum 24 horoj ĉiutage, por akcepti nin, kiel hodiaŭ, ĉar sufero ne elektas specialan horon por ekapero".* Ŝi krome asertis, ke *"ĉi tiu Templo de Frateco, de Solidareco kaj de diverseco omaĝas la Homon kaj ties potencialon, kiun oni tro ofte neas. Tio sentemigas kaj emocias min, tial mi asertas al vi, ke mi eliras el ĉi tie hodiaŭ pli bona ol kiam mi envenis."*

## "TBV estas ia civitano!"


Daniel Trevisan

Alziro de Paiva

La juna legiano **Alziro de Paiva** reprezentis la konstruinton de la monumento. Al la ĉeestantaro de leĝodonantoj kaj amikoj de la Institucio, li emfazis: *"Pasis 18 jaroj. Ŝajnas, ke estis apenaŭ hieraŭ, kiam mia patro mense vidis tiun arkitekturan ensemblon sur ĉi tiu sankta grundo. Mi memoras la tagon de la inaŭguro, liajn parolojn, kiam li ekkriis: '**Envenu, Homaro!'**, kaj la reprezentantoj de la Homaro estis infanoj, maljunuloj kaj handikapitoj. (...) TBV jam ne estas nura fizika konstruaĵo, nura domego en Brasília, ĝi estas ia civitano. Templo de Bona Volo estas tia amiko, pri kiu oni povas kalkuli dum 24 horoj ĉiutage, ia amika ŝultro por konfidi niajn feliĉaĵojn kaj danki por tio, kio estas bona, krom por peti konsilojn. Ĝi estas ia mejloŝtono de venko, ia personigo de la fakto, ke ne ekzistas baroj aŭ malfacilaĵoj, kiuj malebligas al la Homo atingi venkon".*


Lucian Fagundes

# LBV en la mondo

## USONO

Fotoj: Arkivoj BV





Sur la maldekstraj fotoj, la Juna Legianino **Mariana Malaman**, en lernĉambro de publikaj usonaj lernejoj, unu el la volontuloj kiuj efektivigas la Programon *Peace and Good Will Garden*. Supre dekstren: la duflanka kunlaborado de LBV kun la Universitata Hospitalo de Nov-Ĵerzejo, havigante komunuman sanservajn flegojn al virinoj, per profilaktikaj agadoj kontraŭ mamkancero.

## ARGENTINO

Arkivo BV



## BOLIVIO

Arkivo BV



Arkivo BV

## PARAGVAJO



Fotoj: Arkivo BV

## URUGVAJO





1



2


**Fasado de la bela konstruaĵo de la Eduka kaj Kleriga Instituto José de Paiva Netto – ** Inaŭgurita de LBV de Urugvajo je la 29-a de Junio 2007, la loko rekte profitigas la infanojn de 2 ĝis 5 jaroj, krom junuloj kaj maljunuloj, kiuj troviĝas en situacio de socia risko, havigante kulturon kaj altkvalitan edukadon al ĉiuj. Pluraj aŭtoritatuloj prestiĝigis la ceremonion, inter ili la Ambasadoro de Japanio en Urugvajo, **Massami Takemoto** (Foto 1)**.** Ĉi-rilate la japana reprezentantaro finance kunlaboris por efektivigi la projekton. Alziro de Paiva kun la Respondeculo de LBV de Urugvajo, **Maciel Ferreira**, malligis la inaŭguran rubandon de la Kleriga kaj Eduka Instituto José de Paiva Netto, kun kelkaj asistataj infanoj de la Institucio (Foto 2).

## PORTUGALIO

Aŭtobuso de la programo *Feliĉa Rido*, kiun Legio de Bona Volo de Portugalio subtenas kun apogo de volontaj kuracistoj , unu el la agadoj starigataj de LBV en Eŭropo.



Arkivo BV



Arkivo BV



**LBV de Argentino**: Calle José Mármol, 964 Boedo - Buenos Aires | CP 1236
Tel.: (5411) 4925-5000 | www.lbv.org.ar

**LBV de Bolivio**: Calle Cuba, 1905 | Miraflores - La Paz
Casilla de Correo 5951
Tel.: (5912) 222-5749 | www.lbv.org.bo

**LBV de Usono**: 20 Calumet Street, 1st floor Newark/NJ | Zip Code 07105
Tel.: (1973) 344-5338
www.legionofgoodwill.org

**LBV de Paragvajo**: Ruta Mariscal Estigarribia, 1.534, km 9
Fernando de la Mora - Asunción
Tel.: (59521) 520-630 | www.lbv.org.py

**LBV de Portugalio**: Rua Alexandre Herculano, 355 Freguesia da Sé
CP 4000-055 | Porto
Tel.: (35122) 208-6494 | www.lbv.pt

**LBV de Urugvajo**: Av. Agraciada, 2.328 Aguada - Montevideo | CP 11800
Tel.: (5982) 924-2790 | www.lbv.org.uy

# Fábrica de sonhos

**Rio Tókio**

A mais Honda




HONDA

IBAMA PROCONVE Homologado

## Novo CR-V

**Liberdade é ser você mesmo**

**Rio Tókio - Botafogo:** Rua General Severiano, 201 / Rua da Passagem, 175 • Tel (21) 2122-4999 • fax (21) 2122-4990
**Narita - Barra da Tijuca:** Av. das Américas, 2001 • Tel (21) 3987-8888
**Rio Tókio - Recreio:** Av. das Américas, 14.001 • Tel. (21) 2323-9000 • Fax (21) 2323-9026

www.riotokio.com.br • botafogo@riotokio.com.br • recreio@riotokio.com.br

Rio-de-Ĵanejro/RJ, Brazilo